



# TEA-BULTENO

20<sup>a</sup> JARO - N<sup>o</sup> 135

JANUARO - FEBRUARO

N. 1-2/2017

## Karaj Geamikoj! Tutkorajn bondezirojn je Serena kaj Paca 2017<sup>a</sup> Jaro



La 2016<sup>a</sup> jaro estis tre grava por TEA, ĉar ni festis ĝian 110-jariĝon, sed ankaŭ en 2017 ni havas bonan kialon por bele festi, ĉar nia TEA-Bulteno fariĝas 20-jara!

Al ĝi bondezirojn je longa pluvivado, je aperigado de interesaj artikoloj kaj de multaj prikskriboj pri sukcesa Esperanto-agado de TEA!

La du lastaj monatoj de 2016<sup>a</sup> jaro estis sufiĉe plenaj je diversaj okazaĵoj, kiuj vere min tre feliĉigis.

Tutunue mi deziras mencii, ke denove ni ricevis libro-premion de UEA, danke al la fondaĵo *Biblioteka Apogo Maria kaj Johano Bachrich*, du elstaraj venezuelaj gesperantistoj, kies gefiloj donacis monkapitalon por subvencii E-bibliotekojn tra la mondo.

Sekve ni ricevis la jenajn valorajn librojn:

- 1) Lotte en Weimar - Thomas Mann. Tradukis K. Schulze.
- 2) La morto en Venecio - Thomas Mann. Tradukis P. Buijnsters.
- 3) Mi inventas la mondon - Wislawa Szymborska. Trad. diversaj aŭtoroj.
- 4) La Luzidoj - Luís Vaz de Camões. Tradukis L. H. Knoedt.
- 5) Kvin geamikoj - Júlia Sigmund.
- 6) Lingua, politica, cultura - Serta gratulatoria in honorem Renato Corsetti. Red. Federico Gobbo.

Tiuj libroj estas je dispono de TEA-legemuloj!

La 9<sup>an</sup> de novembro okazis la premia ceremonio por la partoprenintoj en la 3<sup>a</sup> Konkurso pri pentrado *Premio Angelo Soranzo*. Alvenis 41 verkoj, el kiuj 29 ellaboritaj de geknaboj, el la italaj regionoj Friulo Juli-Venetio kaj Apulio, el Slovenio kaj Serbio.

La 1<sup>a</sup>, 3<sup>a</sup> kaj 4<sup>a</sup> premioj en la 1<sup>a</sup> kategorio ne estis aljuĝitaj. La 2<sup>an</sup> premion, egalmerite, gajnis Anikó Sambert Belec kaj Ilona Kajari, ambaŭ el Senta/Serbio. Ili ricevis po 200 €.

Se vi ŝatus ridigi Dion, rakontu al li pri viaj projektoj.

*Blaise Pascal, franca filozofo (1623-1662)*

En la 2<sup>a</sup> kategorio por geknaboj, ricevis Specialan Premion, po 50 €, du lernantinoj de mezgrada triesta lernejo: Sarah Gregorič kaj Sara Ivaldi. Speciala Mencio de sama valoro estis donita al Francesca Di Palo, ankaŭ el Triesto.

Al ĉiuj konkursintoj estis donita buntkolora partopren-diplomo.

Tri-foje triestanoj honoris sian Majstron, okaze de lia naskiĝtago, la 15<sup>a</sup> de decembro. Unue en Triesto, la 13<sup>an</sup>, poste en Lubiano, la 17<sup>an</sup>, kaj fine en Rijeka, la 19<sup>an</sup>. Ĉiu proponis interesajn prelegojn, frandajn manĝetojn kaj varmegan etoson!

Sed en novembro, de la 13<sup>a</sup> ĝis la 16<sup>a</sup>, okazis vere neforgesebla evento: ni estis invititaj al Zagrebo de Marija Beloŝevič por festi la 25<sup>an</sup> datrevenon de Kroata Esperantista Unuiĝo. Tute ne eblas priskribi la tutan aranĝon, aŭ, pli bone dirite, "Seminarion pri diskonigo de la kroata kulturo". La abundo de informoj ricevitaj, la multnombraj vizitoj, la altnivela kompetenteco de la gvidantoj kaj de la tradukintino, surprizis kaj sorĉis min.

Jen koncize la programo de tiu 3-taga okazintaĵo: vizito de la monumenta Zagreba tombejo, de la Nacia Biblioteko (4-hora promenado en mirinda libro- kaj dokumento-trezorejo!); interparolado kun la direktorinoj de Organizaĵo, kiu okupiĝas pri disvastigo de kroataj lingvo kaj kulturo en la eksterlandaj kroataj komunumoj; aranĝo en la urbocentra Biblioteko "Bogdan Ogrizović", OMAĜO AL LUCIJA BORČIĆ, okaze de la 95<sup>a</sup> datreveno de ŝia naskiĝo kaj la 1<sup>a</sup> de ŝia morto; vizito de Muzeo de la urbo Zagrebo k.a.




Sed estis io, en tiu maro da interesaĵoj, kio min plej impresis: la trarigardo de la Domo-Muzeo de August Ŝenoa. Nur ĉi-okaze mi aŭdis pri tiu ĉi verkisto, pri kies eksterordinareco mi tute ne sciis. Li naskiĝis en 1838 en Zagrebo, kaj tie mor-



tis en 1881. A. Ŝenoa estis tre fekunda verkisto, romanisto, poeto kaj proza renovigisto. Li influegis la kroatan literaturon modernan. Lia patro estis germano el Ĉeĥa Respubliko, translokiĝinta al Zagrebo antaŭ la fila naskiĝo, dum la patrino estis slovakino el Budapeŝto. Aŭgust Ŝenoa, post la liceo, eklernis juron en Prago sed ne komplet-igis siajn studojn. Unue en Vieno kaj poste en Zagrebo li laboris por ĵurnalaj redakcioj; dediĉiĝis al politiko kaj iĝis komunuma sekretario kaj urba senatano. Dum sia vivo li engaĝiĝis ankaŭ kiel teatra reĝisoro kaj dramisto; verkis historiajn romanojn kaj rakontojn pri plej diversaj temoj: sociaj, politikaj kaj etikaj. Entute, unu el la plej eminentaj verk-istoj kroataj!

Dum aŭskultado de la klarigoj kaj esplorado de la domo, oni klare perceptis kaj sentis lian neordinaran elstarecon kaj miris pro lia produktiveco en la literatura kampo, tiom pli se oni konsideras, ke li mortis tre juna, nur 43-jara, sed la domo, kie li vivis kun sia familio - edzino kaj 6 gefiloj - poste heredita de la posteuloj, konserviĝis ĝis niaj tagoj preskaŭ kun la sama aspekto de kiam tie estis vivinta A. Ŝenoa, sed iom pli riĉigita, ĉar ankaŭ la postaj familianoj estis artistoj, pentristoj kaj entute kleruloj. Nuntempe la muzeo estas private mastrumita de lia pranepino, kiu ĝin malfermis al publiko antaŭ nelonge. Ĉie en la domo flarblas la historio de elstaraj personoj; en vitri-



noj admireblas ĉiutagaj iloj kaj ornamaĵoj, fotoj el tiu bela bruneta koloro, kun rolantoj vestitaj per elegantaj roboj, pentraĵoj de Aŭgusto kaj de liaj filoj kaj de liaj nepoj, kaj fine ... ho, ega surprizo! inter pluraj libroj kaj objektoj al li apartenintaj, en vitra mebleto, jen libro en Esperanto!

Ĝia titolo: La Trezoro de l' Oraĵisto (kroate: *Zlatarevo zlato*). La nepino, informita pri vizito de geesperantistoj, elprenis el hejma libroarkivo, la version en Esperanto el la 1911<sup>a</sup> jaro, en traduko de Fran Kolar-Krom. Ĉi libro, 290-paĝa, estis la unua romano de la kroata literaturo tradukita Esperanten. Krome ĝi estis ankaŭ la unua historia kroata romano, rakontinta la historion de Zagrebo en la 16<sup>a</sup> jc kaj analizinta la rilatojn inter burĝoj kaj nobeloj, inter enlandanoj kaj eksterlandanoj surbaze de historia dokumentaro. La romano estis tradukita en plurajn fremdajn lingvojn.

Do, temis pri neforgeseblaj tagoj, kiujn ni plene ĝuis kaj pro tio dankendas nia kompetenta akompanantino, Marija Beloŝeviĉ, kiu donis al ni la eblon enprofundiĝi en tiom grava kulturo, kaj fine dankon al Esperanto, kiu, pro sia rolo de lingvo-ponto, peris tiom da informoj kiuj vere pliriĉigis nin.

Bonan Novan Jaron kaj multajn agrablaĵojn en Esperantujo.

Via Elda



## Laste trovitaj!

Ordigante la kolekto-arkivon, mi trafis forgesitan poŝtkarton, sur kies fronto legeblas:

*Aspremont (A.-M.) - Bonne Auberge  
Internacia Hejmo Esperanto*

Malantaŭe estas skribite:

POSTKARTO (tiel!)

TEKSTO

ADRESO

Sur la algluita franca poŝtmarko, estas la bildo de Marŝalo Philippe Pétain, violeto-kolora, je nominalo de 60 c. Tute fuŝa estas la dato: lup eo ne sukcesis helpi. Kio tamen certas, post konsultado de katalogo, estas ke la poŝtmarko funkciis de februaro 1942 ĝis novembro 1944. La sendintino skribis france, ne Esperante. Iom pli malfacilas precize dati la eldonon, sed hazardo helpis min, tiel ke pli-malpli dedukteblas, ke kelkaj bildkartoj aperis ĉ. en la 1930<sup>aj</sup> jaroj.

Ĉu iu jam aŭdis pri tiu ĉi Internacia Hejmo Esperanto (*IHE*)? Nedubeblas ke francaj esper-



antistoj scias sufiĉe pri ĝi, sekve mi esperas, ke post legado de ĉi artikolo iu(j) bonvolos kontribui per pluraj kromaj informoj.

Pri Aspremont kaj fondo de la *IHE* mi legis en *Heroldo de Esperanto* (10.01.1932), antaŭ kelke da semajnoj.

En la rubriko [LA BELA MONDO](#), artikolo titoliĝas:

Internacia Hejmo Esperantista

en Aspremont A.M., Francujo

Propraĵo de la Esperanto-Movado, sub aŭspicioj de ICK  
*La artikolo estas subskribita de Georges Avril.*

Je la komenco la artikolisto emfazas la bezonon de la Esperanto-movado pri feridomoj, aŭ hoteloj aŭ eĉ simplaj tranoktejoj por la junularo, entute por tiuj kiuj jam konas la lingvon aŭ kiuj emos ĝin lerni. *Pluraj estis* - li daŭrigas - *la fervoregaj samideanoj tra la tuta mondo* klopodantaj realigi tiun revon, sed pro manko de sperto kaj profesieco, kaj pro troa entuziasmo sen solidaj fundamentoj (necesis almenaŭ ia komenca monkapitalo) la belaj planoj fiaskas. Sed ne forfalas la esperoj, pre-



cipe esperoj trovi iun mecenaton pretan donaci ĉu monon ĉu bienon kun domoj por aranĝi ion.

Mirinde kaj neatendite tiu revo iĝas realo kaj *IHE* estas akirita, danke al financa oferemo de angla paro, ges-roj Theresa kaj Ernest Edward Yelland el Londono, kiuj aĉetas por la movado, je nomo de ICK, malgrandan bienon el 9 ĉambroj, kuirejo kaj ĝardeno. En kiu loko? En Aspremont, Sud-Francujo, meze de sovaĝa kaj belega naturo, facile atingebla de Nico. La paro ekmastrumas ĝin, interkonsente kun ICK. *La plej valora simpati-esprimo do estas vizito al la hejmo je favora okazo*

- per ĉi vortoj s-ro Avril invitas la esperantistaron komenci uzi tiel belan gastejon.

Precipa celo de gesinjoroj Yelland estas *ebligi al ripozema samideanaro agrablan libertemp-an restadon je moderaj kostoj.*

Georges Avril poste tre poeziece priskribas la tutan itineron kondukantan al la bieno kaj la ĉirkaŭajn vidindaĵojn de la tuta regiono, mergitajn en verda kaj pitoreska naturo.

Por havi detalajn informojn, ICK sciigas la adreson: Internacia Hejmo Esperantista (Nia Civito), Aspremont, Alpes Maritimes, Francujo (tiele! Simple, ĉu ne?).

Estus interese koni, ĝis kiam *IHE* funkciis kaj ĉu vere multaj samideanoj profitis de tiu bela libertempejo. Mi enketos kaj enketos...



konsentis pri la elekto de Centra E-komitato, kiu konsistis el ses anoj. La nomo de Centra Komitato poste estis ŝanĝita je ICK, kiu fariĝis la gvida instanco de la neŭtrala E-movado, kun sidejo en Genevo. ICK organizis kunlabore kun la Lokaj Kongresaj Komitatoj ĉiujn UK-jn ekde 1924. La unua prez. de ICK estis Edmond Privat (1923), lin sekvis en 1928 John Merchant. Anoj en la komencaj jaroj: M. Rollet de l'Isle, d-ro J. Dietterle, Rud. Hromada, W. M. Page kaj s-ino J. Isbrücker; anoj en 1932 M. Rollet de l'Isle, s-ino J. Isbrücker, E. Stettler, d-ro A. Vogt kaj Felix Zamenhof, ĉiuj tre

konataj kaj agemaj geesperantistoj. Gvidanto kaj ĉefa efektiviganto de la ĉiam pli ampleksaj laboroj estis Robert Kreuz, ĝen. sekr. (1925), poste dir. de la ICK (1930). Post la interkonsento en Köln (1933) ICK daŭrigis sian agadon en la kadro de UEA.

**Georges Avril** (pseŭdonimo de **Georges Cousmont**) (Cannes, 1874 - Nico, 1952) estis franca esperantisto, ĉefredaktoro de la sudfranca ĵurnalo *L'Eclair de Nice*, aŭtoro de franclingvaj romanoj kaj rakontoj, honorita per ordeno de Honora Legio. Krome li estis la prezidanto de la Internacia Gazetara Komisiono de ICK.

Li estis talentoplena gazetisto kaj paroladisto. Verkis francajn romanojn kaj diversajn broŝurojn. Havigis al Esperanto multajn sukcesojn, precipe en Sudfrancujo. Verkis multnombrajn artikolojn pri kaj en Esperanto, en sia ĵurnalo (ĉiusemajna rubriko) kaj aliaj gazetoj. Post la dua mondmilito Avril apartenis al la unua membraro de la restarigita Akademio de Esperanto kaj estris ĝian Sekcion pri Literaturo (1949-1952).

**Theresa kaj Ernest Edwards Yelland:** Theresa estis rusino, el Poti (Kaŭkazo), tie naskiĝinta en 1882. Ŝi mortis en Aspremont, 1971. Ŝi parolis Esperanton en sia familio. Post edziniĝo kun Ernest Edward, kun li ŝi vojaĝis dum kvar jaroj tra Eŭropo por propagandi la lingvon. Ernest Edward (Devonport, 1880 - supozeble Aspremont, 1969) esperantistiĝis en 1906. Estis prezidanto de la Londona Esperanto-Klubo dum tri jaroj.

Fontoj: *Heroldo de Esperanto* (1932); *EdE*.

**Internacia Hejmo Esperantista**  
 (Propoŝto de la Esperanto-Movado, sub la aŭspicio de I.C.K.)  
**ASPREMONT (A. M.), Franciando**  
 14 km ekster Nice, norde al la Alpoj, stacio Nice  
 La aŭtomobilo de la Hejmo — laŭ aranĝo — renkontas gastojn ekster la stacio

Cel as: Liveri Hejmon apud la Riviero — Aranĝi ekskursojn al la Lazura Marbordo, al la Riviero kaj al la Alpoj Maraj — Ebligi plenaeran vivadon sur la tereno de la Hejmo — Esti ripozejo por nejunaj gesinjoroj — Prizorgi geknabojn, kiuj bezonas sunbanjojn kaj puran, freŝan, sekan aeron — Esti renkontiĝejo por libertempantoj el diversaj nacioj, kie oni uzas la lingvon Esperanto praktike

Prezoj (en francaj frankoj):  
 por tago: unu persono 30,—, geedzoj 35,—; restado dum almenaŭ unu monato: unu persono 25,—, geedzoj 45,—  
**Nenia krompagol!**

Al membroj de UEA, kiuj montras sian karton kun kotizo pagita por la kuranta jaro, speciala rabato de 10 procentoj

Petu senpagan prospekton rekte de la Hejmo!

Nun kelkaj informoj pri:

**Internacia Centra Komitato:** pli antaŭe Centra Komitato de la Eo-movado. Sekve de la Kontrakto de Helsinki, la Konstanta Rezentantaro de la Naciaj Societoj kaj UEA inter-

## Aforismoj

Solidareco ne estas donadi, sed agadi kontraŭ la maljustaĵoj.

*Abbé Pierre, (Henri Antoine Grouès), franca monaĥo, kiu fondis la unuan komunumon EMMAUS.*

## El intaj tempoj

*Aperis antaŭ 109 jaroj - januare 1908 - en la revuo Germana Esperantisto jena klarigo, en la rubriko Respondoj, al demandoj de legantoj:*

D: El kia lingvo devenas la esperanta vorto "edzo"? A.S.

R: S<sup>ro</sup> Raoul de la Grasserie<sup>1)</sup>, kiu kreis lingvon "Apoléma"<sup>2)</sup>, bazitan sur greka lingvo, nomas edzon "sin-dziga" kaj edzinon "sin-dzigissa". Tio kaŭzas la supozon, ke en tiu okazo D<sup>ro</sup> Esperanto ankaŭ uzis grekan radikon, sed li ne povis doni al ĝi la formon "dzig", kiel S<sup>ro</sup> Raoul de la Grasserie, kaj tial li prenis nur la plej karakterizan sonon "dz" kaj aldonis al ĝi la vokalon "e" laŭ la ĝenerala tipo de niaj sufiksoj (vokalo konsonanto). Ĉe S<sup>ro</sup> R. de la Gr. "dzigi" estas "kunigi". Demandistoj [tiel!] demandos: kial la deveno estas greka? Mi respondos: panromanistoj kaj aliaj serĉistoj de radikoj internaciaj havis dum dudekjara ekzistado de Esperanto sufiĉe longan tempon por malkovri ian internacian radikon, kiu povus taŭgi por la ideoj: edzo, edza, edze, edzino, edziĝo, edziĝi, edziniĝi k.t.p., kaj ĝis nun ili malkovris nenion krom "fam" (Molenaar), "marito" (Chr. Schmidt), kiuj ne taŭgas kiel ĝeneralaj radikoj. N. P. Evstiféieff

Ŝajnas, ke la supozo de S<sup>ro</sup> Evstiféieff tute praviĝas; la origina greka vorto estas "zyge" (ζυγέ) = jugo, kaj la radiko "zyg" troviĝas en la teĥnikaj vortoj: zi-zygie, zygo-phylles, zyigma, zygodactyle. (Vidu: Raoul de la Grasserie, *Apoléma*, Paris 1907, p.144.) O. L.

*Pri la sama temo, estas interese legi en la libro, editorita de Gaston Waringhien, "Lingvaj respondoj", la klarigojn pri la lingvo donitajn de la Majstro al liaj demandintoj, en la daŭro de tri diversaj periodoj. I.a. la antaŭparolo de G. Waringhien estas tre interesa pro la historiaj informoj pri la problemoj de eldonado kaj malfacilaj rilatoj interesperantistaj.*

*Jen kion skribis Émile Boirac en la Oficiala Gazeto, dec. 1913, PRI LA SUFIKSO «EDZO»:*

Dank' al afableco de S<sup>ro</sup> Dro Zamenhof, mi ricevis la solvon de tiu malgranda enigmo... La vere primitiva formo estas ne *edz*, sed *edzin*, de kiu devenas la formo *edzo*. Tiel same *fraŭlo* devenas de *fraŭlino*, *kuzo* de *kuzino*, kaj *feo*, kiun oni povus uzi, por montri fablan estulon, ekz. Oberono, kaj kiun oni povas devenigi de *feino*.

La vorto *edzino* estis primitive sufikso, kiu poste fariĝis sendependa de la radikoj, al kiuj ĝi estis primitive aldonita. Jen kiamaniere la Majstro klarigis al mi la aferon:

"En la germana lingvo, reĝido heredonto de la krono estas nomata *Kronprinz*, kiu far-

iĝas en Esperanto *kronprinco*. La virino kunigita kun la kronprinco per leĝa ligilo estas nomata germane *Kronprinzessin*. Ĉi tiun lastan vorton D<sup>ro</sup> Zamenhof transskribis Esperante *kronprincedzino*, kaj li tuj rimarkis, ke la finiĝo de tiu vorto, t.e. *edzino*, ricevis per si mem la sencon de virino kunigita kun viro per leĝa ligilo. Li do faris el ĉi tiu vorto: unue, ĝeneralan sufikson, esprimantan difinitan rilaton, kaj due, vorton memstaran kun tiu sama signifo. Poste el la vorto *edzino* li tute logike devenigis la vorton *edzo*."

*Ofte mi konsultas la binditan kolekton de La Esperantisto, aperinta de 1889 ĝis 1895, gazeto en kiu Zamenhof publikigis siajn Lingvaj Respondoj-n sed ankaŭ respondojn al reformemuloj, kiuj fojfoje adresis al li kvazaŭ minacojn se li ne ŝanĝos - laŭ iliaj proponoj - iajn elementojn de la Esperantaj gramatiko kaj vortaro. Tio ĉi multe min tristigis dum la legado, ĉar klaras, ke tiaĵoj tre suferigis lin dum lia vivo: kontraŭstaroj, malakordoj, malkompreniĝoj kaj maltoleremo estis tute malaj al liaj sentoj, milda karaktero kaj respektemo de ĉia opinio, al lia pensmaniero celanta glatigi la interhomajn konfliktojn kaj superi ĉiajn eblajn kontrastojn ne per vorta batalo aŭ personaj atakoj, sed per ideo interŝanĝo, per amika interdiskutado por kune alveni al la tre aspirata "venko": unuigo de l' homaro per Esperanto.*

Ndr:

1) R. de la Gr. (1839-1914) estis franca juristo kaj lingvisto. Li estis membro de la Ĝenerala Societo de Malliberejoj en Parizo. Kiel juristo li tre influis la ideojn pri la rajtoj je vivo kaj propraĵoj. Kiel lingvisto li studis indiĝenajn lingvojn kaj slangojn kaj influis la personon de Ferdinand de Saussure. Li estis la franca pioniro de sociolingvistiko. En 1892 li eldonis specialan traktaĵon, tuŝantan la problemon de kreo de internacia lingvo el antikv-greka vortara materialo, kun aldonita raciigita kaj korektita gramatiko. En 1907 R. de la Gr. presigis sian projekton de reformita greka lingvo, la *Pacifista internacia lingvo aŭ Apoléma*, kiu estis diskutata en la Komitato de la Delegacio por elekto de internacia lingvo. Antaŭe, li studis la amerik-indiĝenan lingvon *Auca* (Aŭka), kiun li pensis proponi kiel internacian lingvon.

2) La vortoj de Apoléma estas formataj el greklingvaj elementoj, penetrantaj en teknikajn kaj fakajn terminarojn de modernaj lingvoj: ekz. *hipp*, en la vortoj hipopotamo, hipodromo, signifas 'ĉevalo'-n; *anthrop*, en la vortoj filantropio, mizantropio = homo.

Fontoj: Vikipedio kaj *Historio de la mondolingvo* de E. Drezén



Okaze de la 80<sup>a</sup> naskiĝdatreveno de Papo Francisko, Radio Vatikana realigis la aldonitan bildon en kiu estas lia invito "Preĝu por mi", skribita en pluraj lingvoj inkluzive de Esperanto.



### Internacia Jaro Zamenhof 2016-2017

Ni vigle aplaŭdu kaj sincere gratulu la agadon de niaj amikoj en Kubo: KEA, Kuba Esperanto-Asocio, malkovris, la 15<sup>an</sup> de decembro, en Havano la unuan buston lokitan en Kubo, memore de la kreinto de Esperanto.

Dum la ceremonio oni rememoris ankaŭ Fidel Castro-n, kiu okaze de la 95<sup>a</sup> UK, Havano 1990, deklaris: "Mi estas soldato de Esperanto". Dum sia vivo li fervore defendis kaj subtenis nian lingvon en sia Lando.

### Cerbotiklilo 72

Atente rigardu la suban tabelon kaj diru, kiuj nombroj anstataŭos la kri-punktojn ĉeestantajn en la 4-a kaj 7-a vico de la linio d).

Lerta solvonto ricevos libro-premion!



VIGLO


	1-a	2-a	3-a	4-a	5-a	6-a	7-a	8-a
a)	5	8	1	3	6	5	5	2
b)	13	9	4	9	11	10	7	7
c)	22	13	13	20	21	17	17	14
d)	35	26	33	?	38	38	?	31

### Januara Programo

10-a, mardo	17h30 - Ordigado en TEA-sidejo
12-a, ĵaŭdo	17h00 - Unuagrada kurso
11-a, merkredo	14h50 - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno: 25 jaroj de E-agado de Kroata Esperantista Unuiĝo
13-a, vendredo	20h00 - Historio de la
17-a, mardo	17h30 - Ordigado en TEA-sidejo
19-a, ĵaŭdo	17h00 - Unuagrada kurso
20-a, vendredo	20h00 - Novjara Poezio
24-a, mardo	17h30 - Ordigado en TEA-sidejo
26-a, ĵaŭdo	17h00 - Unuagrada kurso
27-a, vendredo	20h00 - Bildoj por la Nova Jaro
31-a, mardo	17h30 - Ordigado en TEA-sidejo

### Februara Programo

2-a, ĵaŭdo	17h00 - Unuagrada kurso
3-a, vendredo	20h00 - Seminario pri Kroata Kulturo en Zagrebo
7-a, mardo	17h30 - Ordigado en TEA-sidejo
8-a, merkredo	14h50 - Esperanto en alirprogramoj RAI UNO
9-a, ĵaŭdo	17h00 - Unuagrada kurso
10-a, vendredo	20h00 - Trafoliumante vortarojn
14-a, mardo	17h30 - Ordigado en TEA-sidejo
16-a, ĵaŭdo	17h00 - Unuagrada kurso
<b>19-a, dimanĉo</b>	<b>10h30</b> <b>Ĝenerala TEA-Asembleo</b> Sekvos komuna tagmanĝo
17-a, vendredo	20h00 - Nia lokoj en "La libro de la Mirindaĵoj" de Marko Polo
21-a, mardo	17h30 - Ordigado en TEA-sidejo
23-a, ĵaŭdo	17h00 - Unuagrada kurso
24-a, vendredo	20h00 - Traduka vespero



BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO  
 Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com  
 Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste  
 Kunvenntagoj: mardo 17-20; vendrede 19-21  
 Tel: (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936  
 Banka Konto: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439  
 Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it  
 Asociaj ttt-ejoj: www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org

# ORDINARA JARA ASEMBLEO DE TEA

La Ĝenerala Asembleo de la membroj de TEA okazos **dimanĉon la 19<sup>an</sup> de februaro 2017 je la 10h00, unua kunvoko, kaj je la 10h30, dua kunvoko.** Ĉi lasta validos kun kiu ajn nombro da partoprenantoj.

## TAGORDO

1. Elekto de la prezidanto kaj la sekretario de la Asembleo.
2. Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa jarkunveno.
3. Raportoj pri la agado dum la jaro 2016:
  - a) Morala raporto de la prezidanto (*Edvige Ackermann*)
  - b) Agadraporto de la sekretario (*Elda Doerfler*)
  - c) Financa kaj bilanca raporto de la kasisto (*Edvige Ackermann*)
  - ĉ) Deklaracio de la revizoroj (*Amalia Zerpini - Giuseppe Valle*)
  - d) Raporto de la triesta katedrestro (*Elda Doerfler*)
4. Elekto de la balot-komisiono.
5. Voĉdonado por la elekto de estraranoj kaj revizoroj.
6. Diversaĵoj (pritraktotaj dum kontrolo de la balotiloj).
7. Anonco de la rezultoj de la voĉdonado.

## DELEGILO

La asociano \_\_\_\_\_

estas delegita anstataŭi min ĉe la Jara Asembleo de TEA, okazonta dimanĉon  
la 19<sup>an</sup> de februaro 2017

Subskribo \_\_\_\_\_

Dato \_\_\_\_\_

### **Notu bone!**

Okaze de la Asembleo eblos pagi al la kasisto la renovigojn de TEA-kotizo, FEI- kaj UEA-membrecoj, abonojn al diversaj ĵurnaloj kaj revuoj, aliĝon al UK ktp ktp. La sekretario peras abon-pagojn al LA GAZETO kaj membro-kotizojn de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista—Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj).